

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Ivo Lapenna (1909-1987):

Granda Movada Gvidanto inter „Aktiva Neŭtraleco“ kaj „Humaneca Internaciismo“

Antaŭrimarko: Krom du-tri atentigoj pri la ĉi tie traktinda libro *Eseoj memore al Ivo Lapenna* en la Esperanto-gazetaro, kiujn oni ne povas nomi recenzoj, la eldonaĵo ĝis nun evidente ne ricevis la publikan atenton, kiun ĝi sendube meritis kaj bezonus. Nu, Carlo Minnaja certe estus verkinta taŭgan recenzon, se li mem ne estus la redaktinto de la libroprojekto, kaj Torben Kehlet, ĝia eldoninto, bedaŭrinde subite forpasis en 2001, ĝuste kiam la libro pretiĝis. Ĉar mi ne posedis la libron, Birthe Lapenna, mem tre okupata pro la diskonigo de la verkaro de Lapenna, bonvolis donaci ĝin al mi, pro tio mi libervole decidis verki ĉi tiun artikolon, por kontribui en konvena okazo al la ‚Lapenna-jaro 2009‘, kiu same kiel la libro mem ricevas sufiĉe magran publikecon.

Lapenna signifis „ĉion“

„Lapenna“ fariĝis ne nur mito kaj legendo, sed ankaŭ provoka nocio, kiu vekas plej diversajn konotaciojn, emociojn kaj reagojn. Dum lia generacio bedaŭrinde estas forpasanta, la plimulto de la nuntempaj esperantistoj ŝajne ne plu konscie perceptas la signifon de tiu korifeo de la Esperanto-movado kaj kontentiĝas pri nebulaj memoroj kaj vagaj opinioj pri tiu supera persono, kiu dividis la mensojn de la homoj en pora kaj kontraŭa sinteno. La artikola kolekto en ĉi tiu memorlibro, kiu estis verkita de eminenta Esperanto-aktivularo, komenciĝas per laŭta adorkanto pri Ivo Lapenna, plenforte elpuŝita de lia vidvino *Birthe Lapenna-Zacho*, kiu estis lia kunulino dum pli ol tridek jaroj. La renkontiĝo kun Lapenna en 1956 kaj la naskiĝo de ilia filo Pierre en 1965 estis la du plej gravaj okazaĵoj en ŝia vivo.

Por Birthe Ivo Lapenna signifis ĉion: Ekde la unua momento, kiam ŝi vidis lin oratori en Kopenhago, ŝi estis tuj ravita pri tiu nekutima personeco, kies multfacetaj talentoj – de muzikisto, sportisto ĝis ĵurnalisto kaj juristo – estis evidentaj. Sekve komenciĝis longdaŭra enamiĝo, kaj Birthe deziras emfazi, ke por Ivo Lapenna ŝi estis la sola amo de lia vivo, malgraŭ antaŭaj geedziĝoj kun Emilija Heiligstein (+1994) kaj Ljuba Knjažinskaja (+1985). Nur post ŝia forpaso Ivo kaj Birthe finfine povis konfirmi sian longan kunvivadon per oficiala geedziĝo, kaj ĉiuj movadaj klaĉoj kaj onidiroj pri la privata vivo de Lapenna perdis sian sencon.

Lapenna – tio estas triobla historio: pri la kritiko de la sovetia komunismo, pri la rilatoj kun diversaj virinoj, pri la teatra spektaklo en la Esperanto-movado.

La kialojn de ŝia adorado kaj amo al Ivo Lapenna Birthe jene resumas: „Senĉese mi estis inspirata i.a. de liaj bonkoreco, inteligenteco, humuro, lia enorma laborkapablo kaj de lia krea kaj genia pensmaniero. Mi ĝuis *ĉiun* momenton dum nia longjara kunestado. En privataj societoj kaj ankaŭ dum grandaj, publikaj festoj li ĉiam estis la centra figuro – i.a. pro siaj eksterordinaraj ĉarmo, beleco kaj vikleco.“ Jen elstara kaj rara ekzemplo de varmega adoro, modela fideleco, vera amo !

Kaj la laŭdaj atribuoj estas daŭrigataj, ĉifoje per la vortoj de profesoro B. Popović en *Jugoslavia Stelo* (dec 1987): Tie ĉi la jugoslavo atestis al sia eks-samlandano tre altajn ecojn kiel „genia intelekto, larĝa eruditeco, scienca pritrakto de la problemoj, plurlingva oratoreco, profunda laborkapablo – ĉio tio utiligata preskaŭ senĉese por progreso de Esperanto-Movado“. Kaj E. Malmgren, la tiama prezidanto de UEA, diris en sia adiaŭa parolado en Kopenhago (1956) pri la etika sinteno de Lapenna: „Neniam mi vidis pli demokratian personon, kiu pli rigore observas la decidojn de la plimulto kiel prof. Lapenna.“ El tiuj citaĵoj

kaj el siaj propraj spertoj Birthe Lapenna (eble iom tro entuziasme) konkludis, ke Lapenna „estis absolute la plej demokrata/civilizita homo, kiun oni povas imagi.“

Ne nur adorado

Carlo Minnaja, prezidanto de la Internacia Instituto Ivo Lapenna, unu el multaj fikciaj instancoj de la Esperanto-movado, bone komprenis la danĝeron de la libroprojekto: Por ke la libro pri Lapenna ne estu nur senkritika adorlibro, sed memorlibro, estis akceptitaj ankaŭ kelkaj kontribuajtoj, kiuj eble iom ĝenas kaj pridubas la imagon pri la perfekteco de Lapenna. Sendube, Ivo Lapenna, lerninta Esperanton en 1928, ekde 1938 komitatano kaj estrarano de IEL (ekde 1947 UEA), 1955-64 ĝenerala sekretario de UEA kaj sekve ĝia prezidanto ĝis 1974, fariĝis speco de heroo de la Esperanto-movado, por kiu li realigis kelkajn, foje iom sensaciajn agadojn: li verkis la Nefermitan Leteron al J.V. Stalin (1952), en kiu UEA kaj SAT kuraĝis kontraŭdiri la lingvan pozicion de la sovetia gvidanto, li fondis la Centron por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo CED (1952) por progresigi la sciencan esploron pri Esperanto, li iniciatis la Belartajn Konkursojn, la Oratoran Konkurson dum UK, la libroserion ‚Oriento-Okcidento‘, la fakan revuon *La Monda Lingvo-Problemo*, li klopodis sukcese por la montevidea Unesko-rezolucio (1954), kiu agnoskis la rolon de Esperanto en la internaciaj intelektaj interŝanĝoj, li starigis la imponan internacian patronan komitaton okaze de la Zamenhof-jaro (1959), kiu prestiĝe protektis la memoraĵojn pri la kreinto de Esperanto, li ĉefredaktis la monografion ‚Esperanto en Perspektivo‘ (1974), kiu en unika formo resumis la ĝisnunajn atingojn de la Esperanto-movado. Eĉ malgrandan politikan skandalon Lapenna kaŭzis dum la inaŭguro de la budapeŝta UK en 1966, kiam li kuraĝe interrompis la orientgermanan ambasadoron, kiu elkraĉis plumpan sovetian propagandaĵon.

Hamburgo 1974

Alia sendube grava epizodo en la vivo de Ivo kaj Birthe Lapenna estis la 59a Universala Kongreso en Hamburgo en 1974, kiam la UEA-prezidanto devis konstati, ke la nova konstelacio de la tiujaraj elekto-cirkonstancoj en la UEA-komitato¹ ŝajnis esti malfavora por Lapenna. La amara sento, ke iuj centripetaj anti-fortoj de diversaj flankoj dinamikas kontraŭ li, kiuj povus malhelpi lian reelekton kiel prezidanto, ofendis lian orgojlon kaj kondukis al la decido abdiki ankoraŭ antaŭ la momento mem de la elekto pri nova estraro. Tiun surprizan rezignon li anoncis afektite en la inaŭgura parolado, rifuzante eĉ la honoran prezidantecon. Ironio de la historio: Dum en la 50aj jaroj dekstremaj usonaj esperantistoj denunciis Ivo Lapenna kiel agenton de Moskvo, Lapenna nun mem suspektis „komunistojn enfiltritajn kaj stiritajn de Moskvo“ malantaŭ la hamburga „komploto“, kiu kondukis al „puĉo“. La interpreto de Lapenna de la tiamaj eventoj estas legebla en la engaĝite verkita libro kun la fama titolo *Hamburgo en Retrospektivo*; sed ĉi-verko lasas multajn demandojn malfermitaj, ekzemple pri la rolo de unuopaj personoj. Ĉi tiu hamburga ŝoko ŝajnis eĉ influi la sanstaton de la patrino de Birthe, Kirsten Zacho, kiu tro frue forpasis (en 1975). Tiuj okazaĵoj malfavore al Lapenna tamen ne malhelpis, ke Peter Zacho poste establis la eldonejon ‚Perspektivo‘ kaj ekde 1981 eldonis la internacian revuon *Horizonto*, kiu fariĝis la publica laŭtparolilo de Lapenna, en kiu li diskonigis sian tutan sinpravigon kontraŭ la ‚malamikoj‘.

¹ En Hamburgo voĉdonis la komitato 1974-77. La oficperiodo de la malnova komitato finiĝas en la lasta tago antaŭ la UK de la elektojaro. En la unuaj monatoj de la jaro la landaj asocioj nomumas siajn komitatanojn A kaj individuaj membroj elektas komitatanojn B, kaj ili ĉiuj ekoficas en la unua tago de la UK, tiam elektante novan estraron.

La „puĉan“ antaŭhistorion kaj ankaŭ la tempon poste senpere travivis la hamburgano *Werner Bormann*, kiu kiel rekta atestanto de la tuta tiama evoluo en UEA protokolas la okazaĵojn, el propra sperto. Kiel germano Bormann prezentas sin mem demokrato, kiu pledis por lokaj kaj landaj rajtoj, dum laŭ lia kompreno Lapenna favoris centrajn decidojn. Bormann pri la tiama debato pri junularo (TEJO, GEJ): „Mi estis por tre vastaj limoj, prof. Lapenna por tre strikta kadro.“ Bormann favoris sendependajn redakciojn, dum Lapenna evidente suspektis tion. Kaj tiel ne eviteblis pluraj miskomprenoj, ankaŭ rilate la neŭtralecon. Bormann, funkciulo kun germana pasporto (kio tiam estis ioma problemo), estis nomata politike naiva. Tiel Bormann enfalis en la kavon de la leono de la alta politiko kaj havis, kiel estrarano pri landa agado, la malfacilan taskon „intertrakti“ gravajn demandojn kun reprezentantoj de socialismaj landaj asocioj. Al Lapenna tiu evoluo ne plaĉis kaj li ne hezitis malantaŭ la dorsoj de la koncernitoj, tiel Bormann perceptis la faron, publikigi akrajn artikolojn kontraŭ tiuj. Dum la „lapennistoj“ kulpigis la komplotulojn, ke tiuj agis laŭ la instrukcio de Moskvo, Bormann deziras emfazi, ke la elektroproceduro en Hamburgo disvolviĝis sub la kondiĉoj de la libera esprimo de volo, laŭ bona parlamenta kutimo praktikata en demokratiaj ŝtatoj, sen enmiksiĝo de la polico, ktp. Kiam en 1983 Lapenna revizitis Hamburgon, li ŝajne iel repaciĝis kun tiu urbo, kiu kaŭzis al li tiom da honto, kiun la kroata aristokrato de dalmata-itala deveno apenaŭ eltenis.

El arkivaj korespondaĵoj de *Reinhard Haupenthal*, pli malpli la sola kontribuanto, kiu referencas al leteroj de Lapenna, sciiĝis, ke Lapenna suspektis kontraŭ Bormann, ke tiu „planas ion por Hamburgo“ por en alia letero veni al la konkludo, ke „la konceptoj de Bormann estas vere danĝeraj“. Ke Lapenna konfliktis kun la propra demokrata sinteno, montras ankaŭ liaj reagoj pri kritiko: satirajn aludojn en la gazetaro li apenaŭ toleris kaj kritikajn leterojn pri „lapennismo“ aŭ simile li lasis sen respondo. Abomenante minorajn intelektulojn kun mediokraj mensoj, kiuj la Esperanto-movadon laŭdire abunde influis, tiel legeblas ĉe Haupenthal, la intelektajn kapablojn de William Auld por esti ĉe la pinto de la Akademio de Esperanto Lapenna konsideris tro „malvastaj kaj sen necesa profundo“. Tiel ekestis multaj interhomaj konfliktoj inter Lapenna kaj la ceteraj esperantistoj.

En siaj du propraj kontribuoj *Carlo Minnaja* protokole enprofundiĝas en la ekscitiga lukto de Lapenna por la alpreno de la montevidea rezolucio en 1954, kiu estas konsiderata kiel epokfara kulmino. Samtempe estas skizata la evoluo de liaj rilatoj kiel estro de UEA vidalvide de la ‚politiko‘ de la junulara sekcio TEJO, kiu pli kaj pli vekis la suspekton de Lapenna. Jen la ĝermo por alia konflikto (inter anoj de diversaj generacioj kun malsimilaj politikaj sintenoj), kiu kunpuŝiĝis kun aliaj kaŭzoj en Hamburgo.

Malgraŭ ĉio – karismo restas

Por *Sven Ziegler*, kiu estis prezidanto de la Alta Kortumo de Danio kaj kunlaboranto de Lapenna en Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (1957-66) kaj en la estraro de Universala Esperanto-Asocio (1962-64), la „malbela komploto“ de Hamburgo signifis nenion alian ol „mikspoto de nelaŭdindaj motivoj“. Ziegler ne spertis la UEA-prezidanton kiel diktatoron, kiel iuj volis lin kondamni kaj stigmatizi. Male, ĉiam havante sur sia skribotablo la statuton de UEA por konsulti ĝin okaze de demokratia demando, li ĉiam substrekis la grandan interdependecon de la laboro kaj sukceso sur internacia, landa kaj loka niveloj.

Pluraj esperantistoj, kiel la germano *Rudolf Kratzmann*, kiu, kiel multaj ‚ordinaraj‘ esperantistoj sen verŝajne tute konscie percepti la politikecan signifon de la evento, konsideras la hamburgan ŝokon kiel kompletan skandalon, atestante, ke multaj homoj estis ĉiam pozitive impresitaj de la nekutima ĉarmo, senduba eminenteco, oratora efiko kaj „grandanimeco“ de Lapenna, eĉ se tiu kelkfoje kapablis severe bruski siajn gekolegojn, kiel la anglino *Marjorie Boulton* rakontas, al kiu Lapenna rifuzis eldoni ŝian biografion pri Zamenhof, ĉar la

manuskripta teksto estis tro fuŝa. Iusence hipnotigita de lia „denaska (?) karismo“ estis ankaŭ *Louis Christophe Zaleski-Zamenhof*, la nepo de L.L. Zamenhof, kiu renkontis Ivo Lapenna nur dufoje en sia vivo, en 1937 en Varsovio kaj en 1960 en Bruselo.

Dum Kratzmann atribuis al Lapenna „senmakulan karakteron“, *John Wells*, prezidanto de UEA inter 1989 kaj 1995, diagnozis klarajn konduktajn defecitojn ĉe sia iama „idealo, inspiranto kaj mentoro“, precipe dum la jaroj 1971-74.

Homo minaca, ĉar efektive libera

En *Horizonto* 71/1987, p. 112-113, Ivo Lapenna skribis, ke li „preferas militon ol rezigni pri mia libereco“. Tio certe estas fortaj vortoj. Laŭ unu el la plej sinceraj admirantoj de Lapenna, *Tyburcjusz Tyblewski*, psikologo el Pollando, la liberecama dalmato estis inteligenta, kuraĝa kaj digna personeco. Pro sia laŭdire preskaŭa perfekteco, kaj intelekta, kaj fizika, li estis ĉirkaŭata de multaj flatantoj, sed ankaŭ de ĵaluzantoj kaj enviantoj. La fuĝon el Jugoslavio Tyblewski klarigis al si per la supozo, ke tia forta individuo estus nepre fariĝinta baldaŭa viktimo en komunisma reĝimo, kiu precipe sklavigis, stultigis kaj trompis siajn civitanojn. Do, tian vojon Lapenna ne celis elekti. La vivo en Okcidento tamen ne estis pli facila, sed pro aliaj kialoj. La konflikton de Lapenna kun sia konscienco karakterizis *Marianne Vermaas*, kiu venigis Ivo Lapenna komence de la 50aj jaroj al Nederlando, tiel: „Dum la milito li batalis kun la partizanoj sub Tito. Li antaŭvidis la eblecon, ke iam li estos de Tito vokita al alta posteno. Vidinte kiel evoluas la postmilita situacio en Jugoslavio li sciis ke, akceptante tion li konfliktos kun sia konscienco, ne akceptante ke li konfliktos kun Tito.“ Ĉi tiu grava dilemo igis lin lasi Jugoslavion malantaŭ si. En 1949, la jaro de lia forlaso de Jugoslavio, oni ankoraŭ elektis lin kunlaboranta membro de la Jugoslavia Akademio de Artoj kaj Sciencoj ! Kio Josip Broz estis por jugoslavo, Lapenna do estis iusence por esperantisto, oni povus diri. Cetere, *Zlata Flego* kaj *Oton Pancner* dediĉis siajn librokontribuojn al la Esperanto-agado de Lapenna dum la zagreba kaj jugoslavia periodoj. Malgraŭ politikaj perturboj, tiu antaŭmilita zagreba tempo devis esti ne malbona. Instigante aliajn, kursgvidanto Lapenna donis al novuloj la necesajn injektojn, regis entuziasmo en tiuj zagrebaj Esperanto-kluboj, ĝis kiam la faŝistoj ĉion detruis kaj mortigis Bude Borjan, la legendecan homon kies nomon portas la zagreba Esperanto-klubo ĝis nun.

Lapenna kiel juristo kaj scienculo

Skizante la karieron de Lapenna kiel juristo, *Klaus Perko* notis pri tiu pioniro el orienta Eŭropo: „Li estis la sola, kiu instruis komparan sovetan kaj jugoslavian juron en tiu ĉi [londona] universitato. Li estis tolerema rilate al preskaŭ ĉia sinteno rilate al marksismo inter siaj studentoj, ĉu malamika, ĉu bonvolema, sed li ne povis toleri tion, kion li nomis parkera marksismo, papagumado de la principoj sen kompreno de la senco. Severa, postulema, tamen senlime pacienca instruisto koncerne taskojn kaj teoriajn aferojn, li dediĉis sennombrajn horojn al tiuj, kiuj serĉis klarigon aŭ pluan kleriĝon. Siajn prelegojn kaj seminariojn li kondukis per sama fajna, olda ĝentileco kaj ĉarmo, kiuj faris lin tiel simpatia kolego.“ Lapenna publikigis plurajn librojn, mallongajn monografiojn kaj proksimume 1200 artikolojn, dokumentojn, notojn kaj recenzojn pri juraj (150-200 titoloj) kaj aliaj temoj, senkonsidere liajn multnombrajn prelegojn, prezentitajn ekzemple dum la Internacia Somera Universitato, kies unua konstanta sekretario li estis. Estis Ivo Lapenna, laŭ kies iniciato en 1957 estis fondita Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), kies prezidanto li mem seninterrompe estis ĝis ĝia dissolvo, kiam eĉ ne troviĝis 2-3 kompetentaj kolegoj, kiuj volus aŭ povus plu gvidi tiun asocion. Kun IEAJ kaj Lapenna ĉesis ekzisti ankaŭ *Internacia Jura Revuo*.

Ralph J. Harry, aŭstralia juristo kaj diplomato, vidas ĉefan meriton de Lapenna, ke li pliriĉigis la teknikan juran terminaron de Esperanto kaj, en *Scienca Revuo*, ekzamenis la problemojn de multlingveco en internacia publika juro kaj kompara juro.

Eĉ la „interna ideo“ de Zamenhof ricevis tra la „Humaneca Internaciismo“, difinita de Lapenna, sian juran grundon kaj pravigon. En tiu doktrino li vidis la esperantistan teorion, kaj praktikon efektiviĝi, por la „rilatado al homo kiel al sia egalulo“ kaj la „respekto al homaj rajtoj“.

Iom malpli konate estas, ke apud ĉio tio Lapenna fondis, en aprilo 1986, kun Paul Neergard kaj trideko da sciencistoj, la t.n. Internacian Sciencan Akademion Comenius, kiel ĝia estrarano *Christer Kiselmann* rakontas en aparta artikolo. Ĉi tiu apenaŭ vivipova projekto havis aliajn celojn ol Akademio de Esperanto, CED aŭ AIS. Sed post la forpaso de Neergard kaj Lapenna tiu akademio ne agadis multe, tiel ke oni nun ne scias kion fari kun ĝi.

Aktiva neŭtraleco kaj humaneca internaciismo

Krom la neŭtraleco, libereco kaj demokrateco, la du konceptojn de la „Aktiva neŭtraleco“ kaj la „Humaneca internaciismo“ Lapenna konsideris kernaj kaj bazaj de la esperantismo. En februaro 1999 *Birthe Lapenna* vojaĝis speciale al Bogoto en Kolombio, Sudameriko, por klarigi tiujn du ideajn konceptojn de sia edzo. Lapenna trovis la esprimon ‚interna ideo‘ neadekvata kaj anstataŭis ĝin per la ‚Humaneca internaciismo‘, kiu ‚estas nek religia, nek burĝa, nek socialisma, nek proleta, nek kia ajn alia, sed tuthoma, tial la plej pura internaciismo senigita de kia ajn klasa, religia aŭ alispeca karaktero‘. Dum la ‚interna ideo‘ ĉe Zamenhof restis nebula koncepto, Lapenna celis ligi la humanecan internaciismon, kiu doktrine estus pli malpli la sama kiel la ‚interna ideo‘, ‚objektive, science korekte kaj pruvite‘ al la Internacia Lingvo kiel la ‚naciaj lingvoj estas nedisigeble ligitaj al naciismo‘. El tio eblas dedukti, ke dum Zamenhof abomenis ĉian naciismon, Lapenna ŝajne vidis en tiu doktrino certagradan apogilon por ia Esperanto-‚naciismo‘. Komprenante la aktivan neŭtralecon kiel engaĝiĝon de la esperantistoj por okupi sian apartan socian pozicion, Lapenna preferis societojn de neŭtralaj esperantistoj anstataŭ neŭtralaj societoj de esperantistoj, en kiuj la membroj devas havi plenan rajton al libera pensesprimado. La nedigestitajn (fi)farojn de 1974 en Hamburgo Lapenna taksis kiel ekzemplon de misuzo de la principo de la neŭtraleco. En la sama senco li akre kritikis, en la revuo *Horizonto*, n-ro 26/1980, la libron *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, kiu aperis en komunisma Hungario sub la redaktado de la iama GDR-funkciulo Detlev Blanke, kiun Lapenna nomis ‚ĉefa ‚ideologo‘ de la unutila kaj unudirekta partipolitika alo“ de la tiama, laŭdire marksisme-leninisme inspirita Esperanto-movado. En la kontribuoj de ĉi tiu libro Lapenna konstatis ne nur strangajn publicajn principojn, sed verajn historiografiajn distordojn. Al la eldonantoj de la libro Lapenna riproĉis, ke ili prisilentis historiajn faktojn, falsis la historion, ke ili estas naivaj kaj deziras plaĉi al siaj politikaj ĉefoj.²

La frustrigo de Lapenna kreskis kun la jaro 1987, kiam la Esperanto-movado devintus, laŭ Lapenna, montri unuecon dum la festado de la centjara jubileo de la zamenhofa lingvo. Kiel *Birthe Lapenna* montras en sia ĉi-koncerna kontribuo, Lapenna ‚terure grande seniluziigis“ kiam la ‚oficiala‘ Esperanto-movado kvazaŭ ignoris la aktivecon de ICNEM, kies memtrudita misio estis organizi la veran neŭtralan movadon kaj kunordigi la ‚komunan, vastan kaj dignan

² Kvazaŭ la retorika ‚venĝo‘ de Blanke sekvis en ‚nekrologo‘ en *der esperantist*, n-ro 2/1988, en kiuj la meritoj kaj la ‚altkvalita kontribuo“ de Lapenna ja estis agnoskitaj, sed lia (politika) rolo en UEA kritikita kun fortaj riproĉoj, interalie kun la asertoj, ke Lapenna ne komprenis la ŝanĝiĝintan internacian mondan situacion, ke li estas tro sentema al objektiva kritiko kaj ke li finfine bremsis la pluan evoluon de la asocio. En siaj provoj kaj sugestoj pri historiografio de GDREA, ekde 1990, Blanke konfesis plurajn problemojn, kiuj ekzistis en tiama GDR kaj kiuj malhelpis objektive okupiĝi pri la historio.

celebradon“ de la Centjara Jubileo. Nu tiun taskon tamen tre publikefike transprenis kaj plenumis UEA mem kun sia pola Landa Asocio kaj la plena subteno de la varsovia komunista reĝimo per la plej amasa UK iam ajn okazinta (per ĉi tiu ekzemplo, kaj ne nur per tiu ekzemplo en la pola kunteksto, eblas cetere trafe montri kiel poste Pollando, la loĝlando de Zamenhof, fariĝis ankaŭ certa problemo por la politike neŭtrala Esperanto-movado, sed objektive analizi tion eblas nur post 1989). Anstataŭ vidi, ke tiu vizio plenumiĝos sub la gvido de Lapenna, la neŭtrala movado de Lapenna (kiu laŭ la juĝo de iuj e-istoj tute ne estis neŭtrala) izoliĝis disde la cetera UEA-movado kaj restis en la ombro de la megaevento en Varsovio. Ankoraŭ en la sama memorinda jaro, kiam en Graz okazis la plej lasta grava konferenco de ICNEM, Lapenna mallauĝe forpasis en Kopenhago, la dua, tria aŭ kvara patrujo de tiu eminenta internaciisto, kiu fumadis tro multe same kiel lia idealo kaj idolo L.L. Zamenhof.

Granda oratoro en bona memoro

Pluraj aŭtoroj fokusigas sian kontribuon al la retorika arto de Lapenna, kies fundamenton li preparis en por esperantistoj famekonata samnoma libro, kiu aperis en tri eldonoj kaj kiu ĝenerale estis eŭforie recenzita. Lia plena teorio reflektas klasikan koncepton, ekde Aristotelo, ĝis Kvintiliano, tra Cicerono kaj Horaco. La lingvoteoriojn de Marr kaj Max Müller li tamen ne sufiĉe kritike pritaksis. Dum centoj da publikaj paroladoj miloj da aŭskultantoj ja ĉeestis, admirante lian oratoran talenton. Ĝenerale Lapenna ne bezonis mikrofonon, ĉar lia natura voĉo atingis eĉ la fundon de grandaj salonoj aŭ teatroj. Kion Lapenna faris kaj ne faris parolante en siaj paroladoj estas fake priskribitaj de *Carlo Minnaja*, kiu konis Lapenna de siaj knabaj jaroj kaj kiu mem studis lian teorion por partopreni oratoran konkurson en 1955 (kiu tamen ne okazis pro manko de aliĝintoj). Komparante la oratoran strukturon kiel literaturan kontribuon ĉe Lapenna pli kun la klasika latina ol kun la zamenhofa tradicio, *Giorgio Silfer* nomas la jugoslav-britan intelektulon „tolerema filozofo, sed en la kiraso de armeestro“. Ĉi tiun impreson certe devis havi ankaŭ *Jean-Luc Tortel*, kiu ĉeestis iun paroladon de Lapenna en 1955, kie la vervulo el la sudo plenumplekse pruvis la potencon de la oratora arto, kiun li nepre envicigis inter la ceteraj artoj. En sia kontribuo, kiu mem estas speco de oratora ŝprucfontano, *Zofia Banet-Fornalowa* ankoraŭfoje akcentas la artajn meritojn de Lapenna, kiuj ankaŭ multe helpis la Esperanto-teatron. Ĉar Lapenna celis pli altnivelan uzadon de la lingvo Esperanto, li do neniel povis neglekti la signifon de arto kaj literaturo en la internacia lingvo. En la organizaj kapablecoj de Lapenna la italo *Glauco G. Pompilio*, kiu funkciis kiel LKK-kasisto en 1955 kaj kiel librotenisto en la CO, malkovris ĉe Lapenna eĉ ion makiavelan. Ĉiukaze, kiel la posta reklamkomercisto konfesas, li povas utiligi la konsilojn de Lapenna ĝis nun. Por la irandevena kuracisto *Shahram Rahim-Saber* Lapenna simple signifis grandan inspiranton, kaj por la belga lingvoinstruisto *Christian Declerck* la elstara kongresparolanto ludis la rolon de forta influanto.

Lapenna kaj la lingvoj

En tre interesa intervjuo kun *Günther Becker* el la jaro 1984 Lapenna donis detalajn sciigojn pri siaj lingvokapabloj. Laŭ tio Lapenna parolis sep lingvojn, kelkajn pli bone, aliajn malpli. Li kreskis kiel dulingva infano, en la itala kaj kroata lingvoj, ĉar lia familio estis ital-devena, ofta fenomeno en Dalmatio. En la lernado de fremdlingvoj sekvis la franca, latina kaj la antikva greka. En Zagrebo aldoniĝis la germana, en 1929 Esperanto kaj dumilite la rusa (1941). Kiam Lapenna translokiĝis al Britio, li devis lerni la anglan lingvon, kio evidente estis

iom malfacila defio. Do entute ne 7, sed 9 lingvoj.³ La anglan lingvon li trovis „neklara, malfacile prononcebla kaj konfuza por la komunika ĉeno“. Kvankam Lapenna bonege ellernis la anglan por povi fari universitatajn prelegojn, li tamen neniam vere adoptis ĝin. Cetere antaŭ ol Lapenna konatiĝis kun Esperanto li venis al la ideo, ke oni povus simpligi la latinon.

Malsama spirito hodiaŭ

Kiel sugestas fikcia konversacio inter Lapenna kaj la rumana profesoro *Ignat Bociort*, kiu neniam renkontis sian jugoslavian najbaron, Lapenna verŝajne kritikus hodiaŭ, se li vivus, la priplorindan situacion de la stagnanta Esperanto-movado, kiu aspektas kiel kredo kun tro malmultaj apostoloj aŭ kiel armeo sen firmaj gvidantoj. Li riproĉus al renegatoj (kiel Carlevaro) ties konfuzajn verkaĉojn (sic), kiuj profetas la morton de la Esperanto-movado. Li ne plu povus trovi la saman spiriton batalantan por la disvastiĝo de Esperanto, kiun iuj kabinetaj teoriuloj eĉ ne deziras. Samtempe li timus, ke la movado fariĝos organizo sen socia prestiĝo, hobiaĵo por pli kaj pli maljunaj homoj. Tristaj perspekivoj ! Sed ŝajnas, ke en la jaro 2009 tiu vizio plene realiĝis.

Aliaj kontribueroj

La pli ol kvarcentpaĝa libro posedas interludon kun pledoj kaj deklaroj de *Juan Régulo-Pérez* kaj *Paul Neergard*, *István Szerdahleyj* kaj *Christian Declerck*. En la dua parto estas presitaj kelkaj artikoloj de ĝenerala intereso kiel pri iu islanda verkisto kaj esperantisto (*Baldur Ragnarsson*), pri la historio de la Esperanto-movado en Malto (*Carmel Mallia*) kaj pri jurisprudenco ĉe Ŝekspiro (*Marjorie Boulton*). Ankaŭ la kontribuon de *Heinz Dieter Maas* pri esploro de la leksiko de du Esperanto-aŭtoroj oni povintus ŝovi al tiu sekcio. Okulfrapas, ke en la memorlibro mankas kontribuajoj ekzemple de Humphrey Tonkin, Ulrich Lins, Detlev Blanke, la ĉefaj kritikantoj de Lapenna.⁴

La apendico konsistas el paroladoj de Lapenna. En la fotaro el la privata albumo pri Ivo Lapenna anekse disponigita al la memorlibro estas eĉ ne unu bildo, kiu montrus Emilija Heiligstein aŭ Ljuba Knjažinskaja, sed abundas fotoj kun Birthe Zacho. Al la libro estas aldonita kompaktdisko kun tri festparoladoj de Lapenna, plus kantado de „La Espero“. Intertempe aperis aparta kolekto de kvin kompaktdiskoj kun paroladoj de Lapenna, kaj en la retujo www.ivolapenna.org estas publikigitaj multaj interesaj materialoj de kaj pri Ivo Lapenna, interalie la akrobatigita versio de diversaj libroj kiel „Esperanto en Perspektivo“ aŭ „Retoriko“, eĉ en la rusa lingvo. Tre bone !

La kontribuajoj, kiuj parte estis elektitaj el prelegoj kaj artikoloj de antaŭaj tempoj (1984 kaj 1985), estas bone redaktitaj kaj legiĝas en flua stilo, lingvajn, ortografiajn kaj tipografiajn erarojn mi ne rimarkis. Tre agrablaj estas la nekutima grandeco de la litertipo de la tekstoj. Do, la libro prezentas tre riĉan materialon kaj estas nepre leginda, nelaste pro tio ĉar fone oni ekscias multajn detalojn pri la historio de la Esperanto-movado dum la vivotempo de Lapenna.

³ En la revuo *Esperanto* (UEA), majo 1968, Lapenna diris en intervjuo, ke tri lingvojn li konsideras kiel „miajn“: la lokan dalmatan dialekton, la kroatian literaturan lingvon kaj la Internacian Lingvon (Esperanto). El vidpunkto de afekcia signifo, la tri menciitaj lingvoj estus al li samaj karaj. Aliajn lingvojn li sentus kiel fremdajn.

⁴ Ĉi tiuj aŭtoroj suke kontribuis aliloke, vd. precipe: Blanke: *Esperanto kaj socialismo ?* Pri la movado sur la „alia flanko“ (2004); Tonkin: *Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado* (2006); Lins: *Ivo Lapenna kaj la komunistoj*. En: *Utila Estas Aliĝo*. Tra la unua jarcento de UEA (2008).

Konkludaj konsideroj

Tri ĉefaj nocioj ligitaj kun Lapenna, kiujn oni atribuadis al li – perfekteco, demokrateco kaj neŭtraleco – reaperadas ofte en la esearo de tiu ĉi libro. Ne ekzistas en la historio de la homaro persono, kiu estis absolute perfekta, senmakula demokrato, strikta neŭtralulo ktp. – tiaj kontraŭdiroj inter revo kaj realeco estis observeblaj ankaŭ ĉe la idealisto Lapenna, kiu en iuj momentoj ŝajne atribuis al sia publika rolo mem troigitan signifon (kiel ekzemple en 1966, kiam li prezentis al UN sian Proponon pri amasapogo de Esperanto). La ‚falo‘ de Lapenna en 1974 sendube evitis bizaran personkulton, de kiu UEA estis minacata laŭ la modelo de iuj orienteŭropaj ŝtatgvidantoj. La stilo kaj vortuzo en la artikolaro de Lapenna, aplikata en la plej lastaj UEA-jaroj de Lapenna en la revuo *Esperanto*, okulfrape iel rememorigas la kalumnian, aŭ polemikan terminaron de certaj konataj politikaj demagogoj tiam modaj („subfosa agado“, „misinformado“, „senmaskigo“, „puĉo“, „atencantoj“, „enfiltrado“, „deformado“, „negativaj fenomenoj“, „mensogo“, „kalumnioj“, „negativaj elementoj“, „konspiro“, „abscesoj“, ktp.). Pli profunda analizo pri la retoriko en la gazetartikolaro de Lapenna restas ankoraŭ verkota.

Sendube, la merito de Lapenna estis, ke frue li parolis klartekston pri la danĝeroj kaj krimoj de la naciŝocialisma faŝismo kaj la stalina komunismo (aŭ bolŝevismo), kaj en sia libro pri la sovetia punjuro li senkompate malkaŝis ĝiajn malavantaĝojn, milde dirite. En tio li ankaŭ ne timis kritiki Esperanto-organizaĵojn, kiuj havis laŭ li ‚tro neŭtralan‘ sintenon ĉi-rilate. En la berna UK de 1947 li celis per rezolucio kondamni la hitleran atakmiliton, sed tiu propono fiaskis, jen la prezo, kiu estis pagenda por la politika neŭtraleco.

Malfacile diri kie en la kazo de Ivo Lapenna, la homo kun la belsona nomo, estas la limoj inter aristokrateco, aŭtokrateco kaj absoluteco, aroganta memfido ĝis ekstrema senkompromisemo aŭ memŝato preskaŭ embarasa. Iu franca korespondanto, kiu renkontis Lapenna kaj scipovas altestime pritaksi liajn trajtojn, foje skribis al mi, ke li estis speco de altnivela politikulo, kiu erare elektis Esperanton kiel sian batalkampon kaj prefere povis esti brila partigvidanto aŭ eĉ ŝtatestro. Kelkaj aliaj samtempoj, kiuj persone konis Lapenna, estas konvinkitaj, ke li ne estis la demagogo kiel oni klopodis lin pentri. Kaj laŭ la rememoro de iu brita esperantisto en publika reta diskutlisto (20.7.09), inter amikoj Lapenna estis tute alia persono ol oni povus supozi laŭ liaj aperoj antaŭ la publiko.

Kiel ajn, Lapenna estis pura *homo politicus*, kies persona kaj profesia sorto estis decidita de la ‚jugoslavia demando‘ kaj de la komunisma erao, kiel la ‚juda demando‘ kaj la carisma politiko influis siatempe la pensadon de L.L. Zamenhof. Ŝajnas, ke Lapenna ne speciale analizis en siaj verkoj la lingvan problemaron de Jugoslavio, kaj religio lasis lin pli malpli indiferenta, almenaŭ publike, kvankam la severaj katolikaj principoj estis al li pro propra sperto en la infanaĝo bone konataj. Lian menson pli okupis la problemoj de moralo kaj etiko, juro kaj justeco. Eĉ se ĝis nun ne estas klare, ĉu Lapenna estis komunisto aŭ ne (ĉu tio tiom gravas ?), temis pri speco de politika disidentulo, kiu klare komprenis la moralajn, etikajn kaj jurajn deficiitojn de la sovetia komunismo kaj kiu kuraĝis tion publike kritiki.

Se jam tuŝi la geografian kuntekston, ni fine konsciu ankaŭ pri la historiaj-kulturaj-juraj-politikaj tradicioj de la urbo kaj lando, de kie Lapenna devenis: el Split, antikva romia urbo, kie Diokleciano demonstris sian imperiestran unikecon per la starigo de pompa palaco kaj kie oni alte taksis la nociojn Humanitas, Urbanitas, Civitas; el Dalmatio, regiono de profunde praa eŭropa civilizo, kiu iam estis pli romana ol slava kaj kie ĉiam blovis la vento de la libereco kaj sendependeco (en la negativa kaj pozitiva senco) – ankoraŭ nun la ĉefa gazeto en Split nomiĝas *Slobodna Dalmacija*⁵; el Kroatio, lando kiu devis defendi sin kontraŭ ŝovinismaj ambicioj de diversaj najbaroj; el Jugoslavio, ŝtato plurfoje metamorfoziĝinta, kiu mem kutimis subpremi opozicion, sed almenaŭ kuraĝe opoziciis kontraŭ Sovetunio kaj la

⁵ Iam Lapenna estis ĝia redakciano.

cetera orienta bloko. Ĉio tio ne povis lasi Lapenna indiferenta, almenaŭ subkonscie. Lapenna estis unu el tiuj komunismo-ekspertoj, kiuj mortis du jarojn antaŭ la historie sensacia kolapso de la totale fiaskinta komunismo kiel politika sistemo en Eŭropo. En la menso de amasoj da homoj tiu forĵetinda ideologio bedaŭrinde pluvis, kio malhelpas rapidan progreson de la koncernaj landoj, kiujn ĝuste tiuj samaj homamasoj devus rekonstrui.

Lige kun tiuj konsideroj ankaŭ la demando, ĉu la fenomeno Lapenna hodiaŭ ankoraŭ imageblas aŭ utilis por la Esperanto-movado, aŭ ĉu ĝi estas balasto de la historio, do „neutiligebla pasinteco“, estas malfacile respondebla. Neutiligebla balasto, ĉar la konkretaj ideoj kaj konvinkoj de tiuj protagonistoj validis precipe por la historie konkretaj periodoj, en kiuj ili agadis kaj kiam iliaj opinioj estis iom allogaj, eĉ por la „ekstera mondo“. Kvankam iuj el liaj ideoj heredaĵoj iel estas daŭrigataj ankaŭ en la nuna UEA, en kiu mankas forta gvidanto, kiu povus kredinde defendi Esperanton, dua Lapenna verŝajne ne ripetiĝos.

Ĉiukaze, Birthe Lapenna, koninte tiun eksterordinaran homon pli ol tri jardekojn, estas konvinkita, ke ŝia edzo „estis genia, kaj ĝis nun neniu kapablis anstataŭi lin“ (p. 289). Povas esti – Lapenna estis eble la sola vera Gvidanto, kiun la internacia Esperanto-movado iam ajn havis, kiu „dinamisme“ (Birthe) laboris ĝis lia lasta tago.

La 15an de decembro 2009 plenumiĝas do la 100a datreveno de la naskiĝo de Ivo Lapenna, kiu laŭ la sama tago koincidas kun la 150a datreveno de la naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Oni ne forgesu tiujn eventojn ankaŭ en 2010.

© Andreas Künzli, 2009

vd. ankaŭ:

<http://www.ivolapenna.org>

<http://esperanto.org/Ondo/H-birthe.htm>

La artikolo aperis en LA GAZETO, n-ro 144/2009, p. 17-24.